



## PILO-PRESS

Internacia

Informservo

N-ro 26/75 11 jul 1975  
Aperas ĉiusemajne

Ne estas tro malfrue!

Abonu nun la nov-  
specan revuon **Eldonanto/Herausgeber:**

"Eŭropa Esperanto-  
Revuo" por 1975 **Ludwig Pickel**  
Postfach 2113

Mendu ĉe Ludwig **D-85 Nürnberg 1**  
Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113  
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

### Novaĵoj el Portugalio

Lisboa (pp) Sub la titolo "Nia Bulteno" ekaperis informa bulteno de Portugala Esperanto-Asocio.

El n-ro 1/ Marto-Aprilo 1975 ni citas:

"NIA BULTENO, dumonata organo de Portugala Esperanto-Asocio, kiu komencas publikigi, salutas la esperantajn gazetojn, organizaĵojn kaj la samideanaron tutmondan.

Post longjara inertece kaj silentado, altrudita de la faŝisma regformo, oni klopodas propagandi Esperanton kaj grupigi la anaron.

La nuntempa politika streĉiĝo ne favoras la tujan disvolviĝon de nia enlanda movado. P.E.A., kiu celas disvastigi la Internacian Lingvon kaj akceli inter ni esperantan kulturon, diligente, ke en baldaŭa estonto Esperanto denove disfloros en Portugalio.

La interŝanĝo kun la esperanta gazetaro ebligos plenumi la paĝojn de Nia Bulteno per taŭga internacia materialo.

Oni petas la alsendon de ekzempleroj de ĵurnaloj, revuoj, informiloj, kiuj permesos al nia organo pluki interesaĵojn kaj sciigi siajn legantojn pri esperantaj eventoj menciindaj.

Al ĉiuj korajn antaŭdankojn! "

"Kiel transpasi la kontraŭaĵojn?" estas titolita artikolo en n-ro 2/majo-junio 1975 de la informa bulteno de Portugala Esperanto-Asocio. Ankaŭ tiun artikolon ni citas laŭvorte:

"La longa dormado altrudita al Esperanto en nia lando kondukis ĝin al tre grava situacio. La plimulto el la kleraj esperantistoj maljuniĝis, kaj nun ne estas junuloj por anstataŭigi ilin... Dum dekoj da jaroj, nia kara afero restis sub la cindroj, el kiuj ĝi malfacilege klopodas reviviĝi, kiel la mitologia Fenikso.

Estas multaj da baroj kiuj ĉe ni malpermesas nian marŝadon, sed mi kredas, ke la plej serioza estas la manko de junaj samideanoj sciopovantaj la lingvon, por alvoki al ĝi la atenton de la personoj.

En ĉi tiu tempo kiam la junularo altrudas al ĉiuj sian volon, movado, kia ajn ĝi estas, kiu ne havas junulojn por ĝin aktivigi, riskas grandan danĝeron.

Grava temo ĉi tiu, por ke la kompetentaj geesperantistoj pridiskutadu ĝin en la proksima renkontiĝo...

Ĉiam kaj ĉie Esperanto progresas malrapide, same kiel ĉiuj grandaj ideoj. Tio estas sciita. Kaj ni tre malkuraĝas pro tio, kompreneble. Tamen, mi ripetas, nia aparta situacio devenanta el la antaŭaj politikaj kondiĉoj de la lando, postulas el ĉiuj ni la tutan forton kaj sindonemon, por disbati la barilojn, kiuj nin ĉirkaŭigas, kaj minacas nin sufoki...

Ĉiuj samideanoj, sufiĉe povsciantaj la lingvon, devas ĉiamaniere kaj ĉieloke ĝin propagandi kaj ĝin lernigi. Kaj tiuj, kiuj ankoraŭ ne sciopovas ĝin, sed kredas je la bono kaj utilo de Esperanto, devas helpi nian "Asocion", tiele ebligante ĝiajn taskojn el kiuj la plej

grava estas la nacia renkontiĝo. La tempo urĝas!

Ĉiuj ĉirkaŭ la "Asocio"!

Ĉiuj disvastigante Esperanton! "

La adreso de P.E.A. estas: Portugala Esperanto-Asocio,  
R. Dr. Joao Couto 1238 r./c. A, L i s b o a 4. Portugalio

\*\*\*\*\*

### Anglalingva elsendo de Radio Vieno pri Esperanto

Vieno (pp) La Esperanto-Redakcio de ORF, Postfach 700, A-1041 Wien, sciigas:

"Sabaton, la 5-an, kaj dimanĉon la 6-an de julio 1975, la anglalingva sekcio de la Poreksterlanda Servo de Radio Vieno sur mallongondoj prezentis intervjuon kun s-ro Adalbert Klatil el Londono, naskita aŭstro, gastanta en sia hejmurbo, pri Esperanto, ties celoj, nuna pozicio kaj ŝancoj en konkureco kun la angla.

Kiel lingva specimeno la ĵus anglalingve disaŭdigita "semajna komentario" estis ripetata en sia santaga Esperanta versio.

Temis pri neatendita program-ŝanĝo, spontanee de la angla redaktoro decidita, kiam li hazarde eksciis, ke en la apuda studio gasto el Anglio partoprenas en la surbendigo de la Esperantlingva programo. Liaj atento kaj intereso estis vekitaj jam antaŭe per tio, ke el ĉiuj sekcioj de la Servo la Esperanta ricevas la plej multajn el-eksterlandajn alskribojn.

Oni transdonis al nia Esperanto-redakcio senbendan kopion de tiu serioza, por Esperanto sendube propagandefika intervjuo, por eventualaj ripetoj ĉe konvenaj okazoj."

### Jarlibro 1975 de UEA aperis

Rotterdam (pp) En amplekso de 400 paĝoj aperis antaŭ nelonge la konata Jarlibro 1975 de UEA. Ĝi entenas ĉefe la adresojn de 3 463 delegitoj en 64 landoj. 1975 la jarlibro aperas nur en unu volumo.

### UNESKO salutas la Universalan Kongreson

Kopenhago (pp) Laŭ informo en la junia numero de la revuo "Esperanto" la ĝenerala direktoro de UNESKO, s-ro Amadou-Mahtar M'Bow sendis salutmesaĝon al la 60a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago. En sia mesaĝo la ĝenerala direktoro de UNESKO bonvenigas la agadon de UEA en la Internacia Jaro de la Virino kiel daŭrigon de la laboro, "kiun ili entreprenis por internacia kompreniĝo kaj interproksimigo de la popoloj". Estis la unua fojo, ke UNESKO, la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por edukado, scienco kaj kulturo, sendis oficialan salutmesaĝon al Universala Kongreso.

### Regiona agado

Esperantistoj vizitontaj Maròkon, bonvolu kontakti anticipe s-rom Emile Mas, B.P. 171, INEZGANE, Maroko, por plani kun li eblajn poresperantajn agadojn surlokajn.

### Eŭropa Esperanto-Revuo

N-ro 4/75 de Eŭropa Esperanto-Revuo aperos la 21an de julio. Ĝi entenas ampleksan kultur-literaturan parton. Abonu Eŭropan Esperanto-Revuon, la novspecan Esperanto-gazeton. Duonjara abonkotizo 8,- GM, jara abonkotizo 16 GM. Mendu ĉe Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113.

### Esperanto por la Olimpikaj Ludoj

Montrealo (pp) Kanada Esperanto-Asocio intencas reeldoni - post aldono de franca traduko - la sportan broŝuron "Saluton Amiko" verkita de ambasadoro Ralph Harry kaj siatempe eldonita de Ludwig Pickel, Nürnberg.

Oni volas eldoni 10 000 ekzemplerojn de la broŝuro. 9000 ekzemplerojn oni volas donace distribui inter la atletoj kaj oficistoj de la venontjara Olimpikaj Ludoj en Montrealo. 1000 ekzemplerojn oni esperas vendi inter esperantistoj.

Adreso: Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 174, Roxboro, Quebec, Kanado H8Y 3E9.

De la unua eldono de la sporta broŝuro "Saluton amiko" haveblas ankoraŭ ekzempleroj. Interesuloj povas mendi ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113, prezo 4,-- GM.

### Venontaj Esperanto-aranĝoj en FRG

#### ROMOLO kaj TANEF invitas

Sabaton, la 27-an de septembro 1975, la fakgrupo Esperanto de la heslandaj Naturamikoj okazigos semajnfinan renkontiĝon en Mörfelden, Naturamika Domo "Waldheim" (fervojlino Frankfurt/M. - Groß Gerau; aŭtoŝoseo Hamburg-Basel, ĉ. 10 km sude de la Frankfurta kruco, elveturejo Langen/Mörfelden). En la sama kadro ROMOLO aranĝos sian ĉefkunvenon dimanĉon, la 28-an de septembro, samloke ek de la 10a horo. Sed la ROMOLANOJ ankaŭ jam estas bonvenaj sabate; por tranoktado en la domo necesas antaŭmendo ĉe Manfred Führer, 6236 Eschborn 1, Am Stadtpfad 9.

Romolanoj ricevos apartan informilon pri atingeblecoj kaj programo, aliaj interesuloj petu ĝin de Elisabeth Ritterspach, 607 Langen, Berliner Allee 1.

#### GEFA-jarkunveno en Treuchtlingen

De la 10a ĝis 12a de oktobro 1975 okazos en Treuchtlingen, Bavario, la 19a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA). Kadre de ĉi tiu kunveno okazos Esperanto-ekspozicio, informa vespero kaj lingva ekzameno.

El la plia programo: Rondirado tra la urbo, aŭtobusekskurso, salut-vespero kun danco, matineo.

Gastoj petu aligilon de Germana Esperanta Fervojista Asocio, sekretario, D-6 Frankfurt/M, Karlstr. 4-6, aŭ de s-ro Josef Weidacher, D-8 München 82, Schneefinkenweg 11.

Kandidatoj por la lingva ekzameno sin anoncu ĉe s-ro Fritz Lautenbach, D-64 Fulda, Am Abtstor 21.

#### Renkontiĝo de GEJ en Pfaffenhofen

De la 5-a ĝis la 12-a de septembro okazos la internacia aŭtuna renkontiĝo de Germana Esperanto-Junularo en Pfaffenhofen, Bavario. Informas: S-ro Gustav Neumair, 8069 Scheyern, Winden 3, aŭ S-ro Klaus Schubert, 2 Hamburg 65, Duvenstedter Triftweg 26 c.

#### Internacia Seminario de GEJ

Inter la 27a de decembro 1975 kaj la 3a de januaro 1976 okazos la 19-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo en Cuxhaven-Berensch. La seminario temas ĉefe pri lingvistiko resp. pri lingvoj en plej ĝenerala senco.

Kapa laboro dum simia varmego

aŭ

Kiel pasigi la sezonon de la kukumoj!

La apuda desegnaĵo estas farita de s-ino Lena Wessel, loĝanta nun en Garmisch-Partenkirchen, en la aĝo de 87 jaroj. Pilo-Press sendas korajn salutojn al s-ino Wessel.

La varmego kulpas pri multo! Eĉ pri eventualaj enuigaj Esperanto-Ekspresoj de Radio Varsovio. Pensado dum tia sezono estas peniga, opinias Jerzy Grum! Mi tute konsentas!

Wessel  
1943



Esperanto en la radio

Varsovio. En la Esperanto-elsendoj de Pola Radio ekaŭdiĝis nova voĉo. Temas pri Bolesław Staszczak, kiu kelkfoje prilaboris kaj parolis la vesperan radian ĵurnalon. Laŭ nia scio li estas ankaŭ ĝenerala sekretario de Pola Esperanto-Asocio. Reaŭdiĝis ankaŭ la voĉo de Pjotr Rowinski. La Esperanto-Ekspreso de la 6a de julio estis tre somereca: feriaj salutoj de aŭskultantoj kaj intervjuoj kun partoprenantoj de feriosemajno ĉe la Baltiko.

Ĉiama temo de la ĉiutagaj programoj estas la konferenco pri sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo. Aliaj temoj: La firmigado de la polaj-mongolaj rilatoj; Homoj de la teatro, Kreantoj de la moderna teatro; En la plena sezono, pri turismo en Pollando. Ĉiam aktualaj estas la ĉiutagaj sciigoj de la radia ĵurnalo! Krome oni eksciis, ke la prezidumo de la ĉefa estraro de Pola Esperanto-Asocio kunsidis!

Berno. D-ro Arthur Baur parolis pri la nova mallongigita fervoja trako de Zürich al Bern. 8 km estas la voja gajno!

Pekino. Krom novaĵoj oni povis aŭdi komenton pri la kunsido de la Konsilantaro pri reciproka ekonomia helpo sub la titolo "Por kies interesoj?"

Zagreb. Post longa tempo mi denove aŭskultis al Radio Zagreb. Por s-ino Emilja Lepenna ĉi-foje parolis Marinko Gjivoje. Temoj: Novaĵoj el Jugoslavio kaj artikolo pri la Ruĝa Kruco en Jugoslavio.

Romo. La trirubrika programo de Radio Romo estas nun relative bone aŭdebla sur ondo 41 m. Interesa, varia programo!

Vieno. Tiu stacio en Nürnberg estas kaptebla preskaŭ nur dimanĉe-matene je la 6,45 horo. Krom la semajna komentario estis disaŭdiĝita artikolo de d-ro Karl Beckmann pri la marĉ-banejo Heydharting, kiun iniciatis profesoro Otto Stöber, kiu kiel pioniro de la Lingvo Internacia, fondis kaj gvidis en Linz, jam antaŭ kvindek jaroj, Esperantan societona.

Resume oni povas konstati, ke la nun funkciantaj Esperanto-elsendoj prezentas vastan skalon da interesaj programoj, kaj ke ĝiaj pozicioj ŝajnas esti firmigitaj. Tamen necesas pli granda subteno per alsendo de korespondaĵoj fare de la aŭskultantoj!